

## Porketo

Kuretis en korto
silente, sen vorto,
en plena kvieto
malgranda porketo.



## Erinaco


Tra la spaco erinaco
pro krurvundo lamas,
lasas korton, iras horton,
ĉar ĝi pomojn amas.



## Heliko

Heliko domon portas, tre penas,
sur dorso domon testudo tenas.
Ĉu ne kompati la povran homon,
ke li ne havas sur dorso domon?





## Antilopo

Per rapida galopo
kuras la antilopo,
ĉar ĝin ĉasas leono
pro sin nutri bezono.



